ANTAŬEN
suplemento de Informilo
1/28 marto 2020

Enhavo: La sonoriloj en Prago

La plej granda sonorilo de la Katedralo en Prago



La Katedralo de Sankta Vito, Venceslavo, kaj Adalberto en Praga burgo estas mirige bela dominanto de la ĉefurbo de la Ĉeĥa respubliko. Do ni iru pli proksimen. Kiel ĉiu preĝejeto aŭ granda preĝejo havas propran sonorilejon, do ankaŭ la katedralo havas sonorilejon. Pli grandan. En la maldekstra turo de la katedralo estas sep sonoriloj, lokitaj en du etaĝoj.

La plej granda estas **Zikmund (Sigmundo)**, kiun laŭ ordono de

Ferdinando la unua muldis en la jaro 1549 Tomáš Jaroš el Brno. La pezo de la sonorilo estas 13500 kilogramoj, suba diametro mezuras 256 centimetrojn kaj alto de la sonorilo estas du metroj.

Pluaj sonoriloj:

Václav (Venceslao) el la jaro 1542, de sonorilfaristo Ondřej Matyáš Pražský,

Jan Křtitel (Johano la Baptisto) farita de sonorilfaristo Stanislav en la jaro 1540,

Josef (Jozefo) el la jaro 1602 de Martin Hilger.

Tri sonoriloj devenas el farejo Ditrich el Brodek u Přerova. Ili nomiĝas: **Dominik** (Dominus), **Maria** kaj **Ježíš** (Jezuo).

Kelkaj sonoriloj estis rekviziciitaj dum ambaŭ mondmilitoj. Ekzemple „Maria“ el la jaro 1542, „Dominik“ el la jaro1556, „Ježíš“ el la jaro 1761 kaj ankaŭ „Funebrosonorilo“ el la jaro 1546. Tiuj ĉi sonoriloj estis substituitaj nur en la jaro 2012.

Ĉiuj sonoriloj estas sonorigitaj per mansistemo, kaj krom la “Zikmund“ sonoradas ĉiun dimanĉon .

Programo de la dimanĉa sonorigado estas jena: je la 11 horo 59 minutoj eksonas tiu la plej malgranda „Josef“. Je la 12.00 horo eksonas „Jan Křtitel“, je la 12a horo kaj 2 minutoj sian sonoron aldonas „Václav“. Kiam

sonoras ankaŭ „Zikmund“, ĝi komencas je la 12.05a horo. Ekbalanci la „Zikmundon“ daŭras 30 sekundojn.

Foto kun kardinalo

Nuntempe la sonorigadon en la Katedralo prizorgas dekkvin regulaj sonorilistoj kaj ok intermitaj. Sep el ili estas virinoj. Por virinoj estas dekkvinminuta sonorado peniga. La plej grava sonorilisto nuntempe nomiĝas Tomáš Stařecký.

Al la sonoriloj ligiĝas kompreneble ankaŭ legendoj.
Antaŭ morto de la reĝo kaj imperiestro Karolo la kvara la funebrosonorilo eksonoris spontane kaj mortanta Karolo diris: „ Ho, infanoj miaj, jam vokas min la Sinjoro, do ke Li restu kun vi eterne“.

Post kiam estis „Zikmund“ farita, longtempe ĝi staris sur la kortego antaŭ la katedralo, ĉar oni ne sukcesis tiel pezan sonorilon levi al la sonorilejon. Ĉiuj ŝnuregoj ŝiriĝis. Oni sukcesis, laŭ la legendo, nur danke al filino de la reĝo Ferdinand la unua Habsburga, kiu kune kun aliaj knabinoj finplektis ŝnuregon el propraj haroj. Tia ŝnurego la sonorilon subtenadis.
Oni diras ankaŭ, ke la sonorilojn ne eblas forŝteli. Sonoriloj ŝarĝitaj sur iu ajn veturilon tiom masiviĝus, ke neniu forto kapablus fortiri ilin.

Kiam krevus la svingilo de la sonorilo „Zikmund“ tiam „faras timo por ĉeĥa reĝolando“.
La legendo ja plenumiĝis en la jaro 2002, kiam la svingilo de la sonorilo „Zikmund“ neatendite krevis. Post du monatoj endanĝerigis Ĉeĥion grandega „miljara“ inundo, la plej granda en la historio.

Laŭ David Černý kaj Wikipedio
Kompilis kaj esperantigis Pavel Nechvíle